

**KVARA PASKA DIMANĈO – 26an de aprilo 2015**

**LA BONA PAŜTISTO ESTAS PRETA DONI SIAN VIVON POR LA ŜAFOJ  
– Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

**El la evangelio laŭ Johano 10, 11-18**

**En tiu tempo Jesuo diris: «Mi estas la bona paŝtisto. La bona paŝtisto estas preta doni sian vivon por la ŝafoj. Sed tiu, kiu ne estas paŝtisto, sed nur dungito por la gardo, kies propraĵo la ŝafoj ne estas, kiam li vidas la lupon venanta, forlasas la ŝafojn kaj fuĝas. Tiel la lupo ilin kaptas kaj dispelas. Ĉi tio okazas, ĉar li estas nur dungito, ne paŝtisto; tial li ne zorgas pri la ŝafoj.**

**Mi estas la bona paŝtisto: Mi konas miajn ŝafojn, kaj ili konas Min, kiel la Patro konas Min, kaj Mi konas la Patron. Kaj Mi donas mian vivon por la ŝafoj. Kaj ankaŭ aliajn ŝafojn Mi havas, kiuj ne estas de ĉi tiu ŝafejo. Ankaŭ de tiuj Mi devas fariĝi paŝtisto. Ili aŭskultos mian voĉon, kaj estiĝos unu greko kun unu paŝtisto.**

**Pro tio la Patro Min amas: ĉar Mi demetas mian vivon, kaj poste Mi reprenos ĝin. Neniu forprenas ĝin de Mi, sed Mi demetas ĝin memvole. Mi havas la povon ĝin demeti, kaj mi havas la povon ĝin repreni. Ĉi tiun ordonon Mi ricevis de mia Patro».**

La bildo de Jesuo kiel Bona Paŝtisto estas sendube tiu plej konata kaj plej amata de la kristanoj, bildo ŝarĝita per multaj, multaj signifoj. Kaj tamen estas strange ke kiam Jesuo prezentiĝas tiele, kiel Bona Paŝtisto, la judaj estroj koleriĝas al li, opinias lin freneza kaj je la fino klopodos lin ŝtonmortigi. Ĉu estas ni kiu komprenis ĉion pri tiu bildo aŭ estis la judoj kiuj komprenis kaj ĝin malakceptis?

Ni vidu kion diras evangeliisto Johano. Antaŭ ĉio Jesuo prezentiĝas pretendante la plenecon de la dia kondiĉo. Kiam en la Evangelio de Johano Jesuo asertas "Mi estas", tio reprezentas la dian nomon. Kiam Moseo en la fama epizodo de la brulanta rubusejo petis al tiu estulo kiu manifestiĝis, la nomon, Dio ne respondis dirante sian nomon, ĉar la nomo limigas iun realon, sed Li respondis dirante iun agadon kiu igas lin rekonebla. Li respondis "Mi estas tiu kiu mi estas". Kaj la hebrea tradicio ĉiam interpretis tiun esprimon, tiun respondon de la Sinjoro kiel tiu kiu estas ĉiam apud sia popolo. Je la tempo de Jesuo, do, per la esprimo "Mi estas" oni indikis Dion. Pro tio Jesuo depostulas la dian kondiĉon.

Kaj li asertas "*Mi estas*" – ne la Bona Paŝtisto – sed "*la Paŝtisto bona*". Kia estas la diferenco? La evangeliisto ne estas parolanta pri la bonkoreco de Jesuo, kiam la evangeliisto devas referenci al la bonkoreco de Jesuo li utiligas la grekan vorton "agatos", de kiu la nomo Agata, kiu signifas 'bonkorecon'.

Ĉi tie, male, Jesuo deklaras ke li estas la Paŝtisto, kaj li utiligas la grekan vorton "kalos", de kiu kaligrafio, bela skribmaniero, kiu signifas "la belan", kiu signifas "la veran". Jesuo do ne estas indikanta propran bonkorecon, sed li estas indikanta ion malsama, ion pli grava. Kion signifas la Vera Paŝtisto? Estis iu profetaĵo en la libro de Ezeĥielo, ĉapitro 34, kie la Sinjoro riproĉis la paŝtistojn de la popolo, ĉar, anstataŭ prizorgi la ŝafaron, ili prizorgis nur sin mem. Kaj tiam ilin minacas la Sinjoro, "*venos tempo kiam mi mem prizorgos mian ŝafaron*". La Sinjoro do estos la ununura vera paŝtisto de la popolo. Nu, deklaras Jesuo, tiu momento alvenis. Jen kial tio vekas la koleron de la religiaj estroj, ĉar ili sentas sin detronigitaj de Jesuo, kiu ilin nomas ŝtelistoj, ĉar ili alproprigis al si mem ĉion kio ne estas ilia, la ŝafaron, kaj murdistoj.

Tiam, la Paŝtisto, tiu vera, tiu "en eminenta senco", estas identigita de Jesuo en lia persono. Kaj kiu estas la karakterizo kiu igas lin rekonebla kiel la Vera Paŝtisto? Diras Jesuo ke "*li fordonas sian vivon por la ŝafoj*". Do ĉi tie Jesuo preteriras la profetaĵon de Ezeĥielo. Dum por profeto Ezeĥielo la paŝtisto protektadis, prizorgadis sian ŝafaron, kun Jesuo la paŝtisto alvenas al la punkto fordoni la vivon por siaj ŝafoj, do li sin preteriras.

Poste Jesuo daŭrigas la bildon de la paŝtisto al tiu kiun li ne konsideras kiel malbonan paŝtiston, sed soldulon. Kiu estas la soldulo? La soldulo estas tiu kiu agas pro propra avantaĝo. La evangeliisto, ni ĉiam tion memorigas,

en tiuj ĉi paĝoj ne eniras en polemikon kun mondo, la hebrea, de kiu la kristana komunumo jam definitive disiĝis, distanciĝis, sed ĝi estas admono por la kristana komunumo por ke ĝi ne refaru la samajn erarojn. En la kristana komunumo do, al tiu kiu agas nure pro propra avantaĝo, pro propra profito, pro propra prestiĝo, Jesuo ne rekonas ajnan titolon, ajnan rolon, krom tiun esti la soldulo.

Ĉi tiu esprimo "Mi estas" estas redirata en ĉi tiu Evangelio, en tiu ĉi peco, eĉ tri fojojn – la nombro tri, laŭ la hebrea simbologio, signifis tion kio estas kompleta. Jesuo do depostulas la plenecon de la dia kondiĉo kaj la fakto ke li estas ĝia Paŝtisto. Kial Jesuo povas aserti esti Paŝtisto? Ĉar li estas la Ŝafido. Nur tiu kiu pretas fordoni la vivon por la aliaj, tiu povas esti la Paŝtisto de la ŝafaro. Kaj, asertas Jesuo, ke li "*konas sian ŝafojn kaj siaj ŝafoj lin konas*". Kiu estas la signifo de tiu esprimo? Estas iu intima, kreskanta, am-superplena komunikado inter Jesuo kaj lia ŝafaro, tio estas inter Jesuo kaj liaj disĉiploj, la kredantoj, kiu similas – diras Jesuo – tiun de la Patro kun li.

*"Kiel la Patro konas Min, kaj Mi konas la Patron. Kaj Mi donas mian vivon por la ŝafoj"*. Estas iu dinamiko de amo ricevita de Dio, kiu transformiĝas en amon komunikatan al la aliaj. Ju pli tiu mezuro de ricevita kaj komunikata amo kreskas, des pli oni alvenas al realigo de ununura realo de iu Dio kiu ne ensorbas la energiojn de la homoj sed komunikas la siajn al ili, iu Dio kiu volas fandiĝi kun la homo por pliampleksigi lian ekziston kaj igi lin la ununura vera sanktejo. Fakte Jesuo diras post ne longe "*La aliaj ŝafoj, kiuj ne estas de ĉi tiu ŝafejo...*". Jesuo venis por liberigi la personojn, kio estas la ŝafejo? La ŝafejo estas io kio donas al vi sekurecon, sed forprenas vian liberon. Jesuo do asertas ke li venis por porti al iu kreskanta liberiga procedo por la homaro kiu ne rilatas nur la personojn kiuj estas enfermitaj en la ŝafejo de la religio, sed en ĉiuj tiuj ŝafejoj kiuj malhelpas la liberecon.

Asertas do Jesuo "*Mi havas aliajn ŝafojn, kiuj ne estas de ĉi tiu ŝafejo*, - li venis por liberigi la ŝafojn de la ŝafejo de la juda institucio - *Ankaŭ de tiuj Mi devas fariĝi paŝtisto*". La verbo "devi" estas faka verbo utiligata de la evangeliistoj kiu indikas la plenumon de la dia volo. Estas do volo de Dio iu liberiga procedo. La religio ravas ĉar ĝi donas al vi sekurecon, tamen ĝi forprenas de vi la liberecon. Ĝi donas al vi sekurecon ĉar kiam vi eniras en la kadron de la religio vi devas nur obei, vi devas observi, sed tio tenas vin en infaneca kondiĉo, de nematuriĝo; Jesuo male volas porti la personon al plena maturiĝo, al plena kresko.

*"Ili aŭskultos mian voĉon"*, la voĉo de la Sinjoro neniam estas trudata, sed proponata. Kiel oni povas distingi la voĉon de la Sinjoro? Dum la religiaj aŭtoritaultoj, ĉar ili estas la unuaj kiuj ne kredas je sia mesaĝo, devas ĝin trudi, Jesuo, kiu konscias ke lia mesaĝo estas la respondo de Dio al la bezono de vivpleneco kiun ĉiu persono havas en sia eno, devas nur ĝin proponi, kaj la ŝafoj, la ŝafaro, la kredantoj tion komprenas.

*"Kaj estiĝos unu grego kun unu paŝtisto"*. Pasintece, pro eraro de traduko, pro konfuzo de la vorto "ĉirkaŭbaraĵo", ŝafejo", probable fare de Sankta Jeronimo, la latina traduko estis "unu nura ŝafejo kaj ununura paŝtisto". De tio la pretendo de la Eklezio dum jarcentoj, dum multaj kaj multaj jarcentoj, ĝis la Dua Vatikana Koncilio, esti la ununura ŝafejo en kiu estis la savo. De tie la slogano "ekster la Eklezio ne estas savo".

Jesuo ne venis por forpreni la personojn kaj la ŝafojn de la ŝafejo, Izraelo, por ilin enfermi en alian ĉirkaŭbaraĵon pli sanktan, pli belan. Ne! Jesuo venis por doni la plenan liberecon: unu ŝafaro, unu Paŝtisto. Kion volas diri Jesuo? La ununura vera sanktejo en kiu ekde nun manifestiĝos la grandeco kaj la brilo de la dia amo, estos Jesuo kaj lia komunumo. Dum en la antikva sanktejo la personoj devis iri kaj pluraj estis el ĝi ekskluditaj, en la nova sanktejo, estas la sanktejo mem kiu iros serĉi la ekskluditojn de la religio.